

NIA PONTO

Grupo Esperantista Barrencalle Barrena, 7- 1ª deksstre 48005-BILBAO (Hispanio) Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es) TTT-ejo: esperantobilbao.tk	Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.) ☎ 619.694.683 (Iciar) ☎ 658.709.087 (Jesús) 💻 esperantobi@gmail.com
Jar-kotizoj: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €. BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550	

NOVIEMBRO/DECEMBRO 2014

Nro. 101 (3/14)

ALPROKSIMIĜAS LA INTERNACIA ESPERANTO-TAGO.

La 15an de decembro, kiel ĉiujn jarojn, oni celebras la Internacian Esperanto-Tagon, ankaŭ konatan kiel *Zamenhof-Tago*. La plimulto de la esperantistaj grupoj en Hispanio organizos ian tipon de celebrado, kaj do ni kuraĝigas la legantojn demandi en sia loka klubo, aŭ tiu sufiĉe proksima, por scii kiujn kunmemorojn oni organizos. En la retejo de la Federacio ni antaŭnelonge aktualigis la liston de grupoj kaj asocioj esperantistaj, pli-malpli ligitaj al HEF, aktivantaj en la lando. oni povas konsulti ĝin en: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/grupos-en-espana>

(“La Bitbulteno”. HEF. Nro. 11. 17/11/2014)



DÍA DE ZAMENHOF.

Como es tradicional, por estas fechas se celebra, en todo el mundo, el aniversario del nacimiento del creador del Esperanto, Ludwik Lejzer Zamenhof (Białystok, 15/12/1859). En el Grupo de Bilbao nos juntaremos el **sábado 13 de Diciembre, a las 19:30 h.**, para charlar un rato alrededor de una mesa y degustar la comida que aporten los asistentes. Os esperamos a todos y, naturalmente, también a vuestros amigos y familiares.

EN LA JURNALO “EL DIARIO VASCO”.

Traducida la correspondencia de Santiago Arizmendiarieta con Toribio Etxebarria.

La comisión Ego Ibarra, que preside la concejal Carmen Larrañaga (PP), ha llevado a cabo la traducción de la correspondencia que mantenían el esperantista eibarrés Santiago Arizmendiarieta (1903-1977) con Toribio Etxebarria. Todo el fondo de Santiago está siendo clasificado por Ego Ibarra. Contiene, entre muchos otros escritos, 47 extensas cartas en esperanto que han sido traducidas al euskera por el traductor **Aitor Arana**.

Toribio Etxebarria, en su obra “Viaje por el país de los recuerdos”, rememora la creación del grupo esperantista eibarrés y recalca la figura de Santiago, primer maestro de esperanto de Eibar; a partir de un grupo formado en la biblioteca del Centro Obrero, se creó un grupo esperantista. Después, con el tiempo, Toribio Etxebarria impartió clases de esperanto pero, al final, su alumno y amigo Santiago Arizmendiarieta aventajó y superó al maestro en el conocimiento de la lengua creada por Zamenhof; dió lecciones en el Club Deportivo de Eibar y era habitual que acudiera a reuniones y a congresos de esperanto (Oviedo, Bilbao, la Universala Kongreso de Madrid en el 1968).

En julio de este año, Ego Ibarra encargó la traducción del citado epistolario al traductor **Aitor Arana**. En una de las cartas, dirigida a Toribio Etxebarria, fechada el 10 de marzo de 1957, Santiago Arizmendiarieta le dice que puede responderle en euskera, en español o en esperanto, pero que él está empeñado en escribir sobre cualquier cuestión en esa última lengua, a pesar de saber que nunca llegará a la perfección; que confía en que su interlocutor pueda entenderle a pesar de las faltas que pueda cometer.

También se lamenta de la falta de tiempo por no poder traducir artículos que le resultan de sumo interés y que, como también tiene que redactar lo que Toribio llama «recuerdos de guerra», aprovecha los domingos para encerrarse en los locales del Club Deportivo a pesar del buen tiempo de aquel soleado febrero del 57 que propiciaba que los eibarreses paseasen por Usartza, Arrate, Kalamua y otros montes de los alrededores. Este trabajo de traducción de **Arana** nos traslada a un tiempo en el que las cartas eran poso de reflexión y, a la vez, reflejo de una exquisita educación que se trasluce formalmente en los textos. Libros y correspondencia es el legado dejado a Eibar por Arizmendiarieta.

(“El Diario Vasco”. 04/10/2014)

**LA GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO DEZIRAS AL
ĈIUJ SIAJ MEMBROJ, AMIKOJ KAJ SIMPATIANTOJ
SUKCESAN KAJ ĜOJIGAN JARON 2015. ESTU
FELIĈAJ!!!**

ESPERANTO EN TELEVIDA SERIO

La sukcesa televidserio "El sekreto de Puente Viejo" ("La sekreto de Malnova Ponto"), kiun elsendas ĉiuvespere la tuthispana televidstacio Antena3, enkondukis lastatempe novan argumenton, kun ĉefrolo de la lingvo Esperanto, pere de instruisto de tiu lingvo, kaj la penoj por ĝin enkonduki en la vilaĝon kie la rakonto disvolviĝas. Oni povas spekti la ĉapitrojn en la televida stacio mem kaj ankaŭ en la retejo <http://www.antena3.com/series/el-secreto-depuente-viejo/>.

(La Bitbulteno de HEF. Nro. 10. 02/10/2014)

PLANOJ PRI VENONTA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

La estraro de HEF akceptis la proponon de la valenciaj esperantistoj ke la 74-a Hispana Kongreso de Esperanto okazu en la provinco de Valencio, konkrete en la urbo Cullera, en la unua semajnfino de majo.

(La Bitbulteno de HEF. Nro. 10. 02/10/2014)

LIBRO DE RAFAELA URUEÑA.

Laste aperis - La plej novaj varoj ricevitaj de la Libroservo de UEA.

"Eŭropa Unio, paŝon post paŝo", Rafaela Urueña, *Politiko*, Andaluzia E-Unuiĝo/Esperanta Jura Asocio, 2014. La libro, dividita en 7 ĉapitrojn, rigardas al Eŭropa Unio retrospektive kaj perspektive. Prezo: 15.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: <http://katalogo.uea.org?inf=9107>

(Dario Rodríguez. 08/11/2014)

VERKO DE SENEKO EN ESPERANTO.

Libroservo de UEA anoncis la aperon de esperanta versio de verko de la filozofo Seneko, naskiĝinta en Kordovo en la jaro 4 aC:

"Mallongeco de la vivo / De brevitae vitae", Seneko, *Filozofio*, Fonto, 2014. El la malmulta tempo kiun ni havas, multon ni perdas. Prezo: 6.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: <http://katalogo.uea.org?inf=9111>

Pri Seneko: http://eo.wikipedia.org/wiki/Seneko_la_pli_juna

La verko estas rekte tradukita el la latina far la nederlanda esperantisto Gerrit Beverling, verkinto de ampleksa Antologio Latina en Esperanto. La teksto aperas latine kaj esperante.

(Dario Rodríguez. 11/11/2014)

« PODEMOS » KAJ ESPERANTO.

Podemos-uloj opinias pri esperanto. Ili almenaŭ priokupiĝas pri la monda lingva problemo "siameniere".

Esperanto?

Reddit

*La Democracia Lingŭística, la neutralidad y la igualdad tienen que contemplar todas las posibilidades, y el **esperanto** es la más asequible para todos ...*

(Anthony Sarm Dom. 11/11/2014)

PROPONO POR ESPERANTO EN RETEJO DE “PODEMOS”.

Pueden votar la propuesta que he realizado en Plaza Podemos sobre el esperanto: [http://es.reddit.com/r/podemos/comments/2m5naa/una segunda lengua en toda la ue que no/](http://es.reddit.com/r/podemos/comments/2m5naa/una_segunda_lengua_en_toda_la_ue_que_no/)

Para darse de alta en reddit no es necesario ni siquiera dar un correo electrónico, y darlo sólo sirve para recuperar la contraseña si la olvidan. Respetan al máximo los datos personales.

Simplemente pulsen la flecha hacia arriba de la esquina superior derecha de la propuesta y aparecerá una ventana para darse de alta (usuario y contraseña, el correo no es obligatorio). Luego pueden dejar algún comentario que pueda servir a los ajenos al esperanto para que piensen en las ventajas.

(G. Molleda skribis hodiaŭ en lemu.net 16/11/2014)

KURSOJ DE ESPERANTO EN TERUEL KAJ HERRERA DEL DUQUE.

Pri la nova eldono de la kurso de Esperanto en Teruel aperis novaĵo en "Diario de Teruel"

<http://www.diariodeteruel.es/noticia/58420/el-barrio-de-san-julian-pone-en-marcha-su-segundo-curso-de-esperanto>

Kaj oni ĵus konfirmis ke morgaŭ merkredo iros la Aragona Televido por filmi dum la kurso.

Ankaŭ en Herrera del Duque (Badajoz) hodiaŭ komenciĝis ateliero de Esperanto. Vidu <https://www.facebook.com/esperanto.es/posts/940565499304098>.

Gratulegon al Alberto kaj Javier!

(Toño del Barrio. 25/11/2014)

Naskiĝis “HISTORIEJO”.

Nova esperanta jutuba kanalo kreita por kontaktigi nin kun la E-historio. Frandu jam ĝian unuan filmon, plene en Esperanto: “Mirinda Kroatio”.

<http://youtu.be/XI52rNC9Uko>

Aliĝu al HISTORIEJO.

www.youtube.com/user/Historiejo

(Miguel Gutiérrez Adúriz. 02/10/2014)

TRA LA MONDO ...

KURIOZAĴO.

"The working languages of the IRO are English, Spanish, German, French, Chinese Mandarin and Esperanto". (*"Laborlingvoj de IRO estas la angla, hispana, germane, franca, ĉina mandareno kaj Esperanto"*)

Ni ne tro ĝoju: tiu IRO ne plu ekzistas, almenaŭ ne sub tiu nomo.

International Refugee Organization (Twilight of a New Era)



Internacia Organizaĵo pri Rifugiintoj

The International Refugee Organization (IRO) is an autonomous international organization collaborating with the League of Nations and the International Committee of the Red Cross.

(Francisco Javier Moleón. 01/11/2014)

Membrokresko 2014 atingebla! Membriĝu aŭ remembriĝu al UEA.

En 2014, UEA supezeble atingos etan membrokreskon. Ekzistas ankoraŭ eta ŝanco atingi la magian ciferon 5000. Nun UEA havas 4851 membrojn, nur 52 malpli ol la fina sumo 2013.

Ĝenerale kelkaj membroj membriĝante por 2015 ankoraŭ pagas por 2014. Fondaĵo Canuto ĝis nun kontribuis 707 kotizojn (en 2013 estis 743 kotizoj). Do se ankoraŭ venus donacoj por Fondaĵo Canuto por 53 membroj ni jam atingus membrokreskon. Ĉiujare per siaj diversaj fondaĵoj (inter aliaj Fondaĵo Canuto) UEA donas konkretan subtenon al asocioj kaj aktivuloj en Azio, en Afriko, en Ameriko; per tiu agado, nia komunumo fariĝas kulture pli kaj pli riĉa, bunta, inkluziva.

Ege multe dependas de vi mem. Per membriĝo aŭ remembriĝo al UEA, oni kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto, helpas al instruaj agadoj kaj trejnadon de aktivuloj kaj plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado en la mondo.

(Martin Schäffer. Ĝenerala Sekretario de UEA. 04/11/2014)

ARGENTINO: CRISTINA, SOROS, ESPERANTO ...

Bedaŭrinde, la argentina ĵurnalo "La Voz" nur aperigas parton de la artikolo mencianta Esperanton (<http://www.lavoz.com.ar/ciudadanos/la-lengua-universal-esperanto>). La aperanta teksto diras:

La semana pasada, la presidenta Cristina Fernández se reunió con el magnate húngaro George Soros para dialogar sobre las perspectivas de la economía argentina.

En esta oportunidad, el foco de esta columna estará puesto en el padre del millonario financista, Tivadar Soros, por el manejo que este tenía del esperanto. Él había aprendido este idioma en un campo para prisioneros de guerra en Siberia, durante la Primera Guerra Mundial.

El esperanto es un idioma auxiliar, es decir que busca ser una vía de comunicación entre individuos que hablan distintas lenguas maternas.

Hoy la lengua auxiliar más extendida es el inglés. Sin embargo, el esperanto ocupa un lugar importante en las formas internacionales de comunicación.

(Darío Rodríguez. 30/09/2014)

ESPERANTO OFICIALE FARIĜIS NEMATERIA KULTURA HEREDAĴO DE POLLANDO.

La 20-an de novembro prof. Małgorzata Omilanowska, la pola ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo, aprobis lokigon de la lingvo Esperanto sur la "Polan liston de nemateria kultura heredaĵo".

Tio estas rezulto de klopodoj iniciatitaj de Edmund Wittbrodt, membro de la pola senato, kaj s-ro Kazimierz Krzyżak, estrarano de la Pola Asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE-PL).

La nuna sukceso estas bazo, antaŭkondiĉo por proponi al UNESKO enlistigi Esperanton sur la "Reprezentan liston de nemateria kultura heredaĵo de la homaro".

(Novaĵservo RET-INFO/Lingvo-Studio, L.S. www.eventoj.hu 21/11/2014)

PRI LA SAMA TEMO.

Oni demandis al mi ĉu la sensacia novaĵo pri aldono de Esperanto al la Listo de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj de Pollando, dissendita far RetInfo, ankaŭ aperis en publikaj amasmedioj de Pollando, cele al pli serioza kaj dokumentita disvastigo de tiu grava atingo de nia lingvo. Tiucele mi demandis tion en Libera Folio. Jen hodiaŭa preciza respondo de Lu Wunsch-Rolshoven:

Jen en polaj retejoj kaj gazetoj:

- Pola Televido, Białystok, <http://www.tvp.pl/bialystok/aktualnosci/kultura-i-sztuka/esperanto/17785309>
Język esperanto wpisany na Polską Listę Dziedzictwa Niematerialnego 15:02, 24.11.2014
- Dziendobry.bialystok.pl
<http://dziendobry.bialystok.pl/esperanto-na-liscie-niematerialnego-dziedzictwa-kulturowego/>
Esperanto na Liście Niematerialnego Dziedzictwa Kulturowego 22 listopada 2014
- bialystkonline.pl
<http://www.bialystkonline.pl/esperanto-moze-traffic-na-liste-unesco.arttykul,81558,8,1.html>
Esperanto może trafić na Listę UNESCO. 2014-11-23

(Darío Rodríguez. 25/11/2014)

Du studprogramoj por Esperanto-instruado estis akceptitaj en granda rusia universitato.

Ni ĝojas informi, ke la 14-an de novembro 2014 en Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) dum kunsido de Scienca Konsilio estis akceptitaj du studprogramojn por Esperanto-instruado.

La 19-an de novembro laŭ la specialaj ordoj ili estis oficiale validigitaj. Ĉar RUDN estas ŝtata universitato de federala nivelo kun rajto de memdifino de la studprogramoj, tiuj ĉi programoj iĝis aŭtomate tutrusiaj kaj atestiloj de la sukcesintoj estas agnoskataj tra la tuta Rusio kaj en dekoj da landoj, kiuj havas specialajn edukadajn kontraktojn kaj interkonstentojn kun Rusio.

La unua studprogramo nomiĝas "Baza kurso de Esperanto" kaj celas studentojn kaj homojn, kiuj jam havas universitatan kleron. Fininte tiun kurson la lernantoj rajtas ricevi ŝtatan atestilon pri aldonaj profesiaj konoj.

La dua studprogramo celas lernejanon de la lastaj studjaroj kaj ajnajn aliajn homojn sen universitata diplomo. Ĝiaj finintoj ankaŭ ricevas specialan atestilon.

Ĉi semajne la unuaj du grupoj de lernantoj komencis lerni Esperanton laŭ tiuj ĉi programoj en RUDN.

Tiujn kursojn antaŭis senpaga 5-leciona "fulmo-kurso", kiun sume partoprenis pli ol 30 personoj en 3 grupoj. La finintoj ricevis honorajn diplomojn kun subskribo de la dekanano de filologia fakultato. Eldonejo Impeto donacis por la kurso libretojn kun Esperanto-gramatiko, kiuj estis senpage disdonitaj al ĉiuj partoprenantoj de la kurseto.

(Dima Ŝevĉenko. 22/11/2014)

TEJO EN PLENUMORGANO DE GRAVA INTERNACIA ORGANIZO.

Kun grandega ĝojo mi informas vin pri grava sukceso en Eksteraj Rilatoj. TEJO estis ĵus elektita en la prestiĝa ĉefa plenuma organo de la Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj (IKRJO) - <http://eo.wikipedia.org/wiki/IKRJO>.

Tiu granda atingo estis ebla ĉefe danke al la senlaca laboro de Fernando Maia Jr., brazila aktivulo kaj prezidanto de BEJO, kiu multe laboris por la kandidatiĝo de TEJO. Fernando nun estas en Bakuo, Azerujo - por partopreni en la 1a Monda Forumo pri Junularaj Politiko, kaj en la IKRJO-renkontiĝoj.

Tio estas granda sukceso por TEJO. Ĝi ricevis same multe da voĉoj kiel grandaj kaj konataj organizoj (ekzemple YMCA) kaj eĉ pli ol la Monda Skolta Organizo.

Tiu ĉi sukceso sekvas multjaran laboron de TEJO en Eksteraj Rilatoj. Ĝian komisionon formas 47 anoj, kiuj estas tre aktivaj, retumas kun pluraj organizoj, partoprenas pozitive kaj konstrue en pluraj eventoj tra la mondo. En la lastaj jaroj TEJO estis reprezentata plurfoje en oficialaj junularaj aranĝoj en Eŭropo, Ameriko, Afriko kaj Azio. Tiu ĉi sukceso estas sukceso de ĉiuj laborantoj kaj subtenantoj, kaj ĉiujn mi volas elkore danki per tiu ĉi mesaĝo.

(Francesco Maurelli, Komisiito de TEJO pri Eksteraj Rilatoj. 22/11/2014)